## La Granda Vortaro Hispana-Esperanta, de Fernando de Diego, en Interreto



La Granda Vortaro Hispana-Esperanta, de Fernando de Diego, publikigita en la jaro 2003, nun povas esti konsultata pere de Interreto.
Ties enhavo, konstante aktualigata, estas trovebla en la ret-adreso:

http://www.esperanto-es.net/diccionario/inicio.asp

# Nova sidejo de A.E.A.

Nia Astura Esperanto-Asocio estas enkadrigita en la Katedro "Jovellanos" pri Universitata Disvatigado. Tiu aparteneco al la Universitata strukturo utilis al ni, interalie, por la uzado de iu ejo kiu disponigis al ni tiu institucio. En monato junio de la nuna jaro, post la finiĝo de ĉiuj kursoj en la Domo de la Katedro, oni efektivigis la translokigon, planita antaŭlonge, de ĉiuj dependaĵoj, inter ili nia Esperanto-Grupo, de tiu centro al nova konstruaĵo, konkrete, la antikva "Lernejo pri Komerco", poste nomata "Lernejo Jovellanos pri Entreprenaj Studoj", en la numero 1 de la strato Tomás y Valiente.



En tiu nova loko oni disponigis al ni bone situitan ejon, multe pli ampleksa ol la antaŭa kaj tre taŭga por niaj laboroj de Esperanto-instruado, kunsidoj…

Kun tiu translokiĝo finiĝas por nia Grupo de Esperanto iu longa periodo de ĝia historio. En la antikva Domo ni "loĝis" ekde la fondiĝo de la Ateneo Jovellanos, en la jaro 1953. Tiam nia E-Grupo estis enkadrigita en tiu organizaĵo kaj rekomencis la funkciadon kiu interrompiĝis je la komenciĝo de la Civil-milito en la jaro 1936.
Tia organiza situacio daŭris ĝis la epoko de la demokratiigado, post la jaro 1977, kiam estis denove leĝpermesita la rehavo de la antikva titolo "Astura Esperanto-Asocio", kaj de tiam ni estas enkadrigataj en la Universitata Katedro.
Esperante ke la nova ejo estu loko de granda kaj profita laboro favore al la Internacia Lingvo, ni profitas la okazon por danki al la Catedro "Jovellanos" pro tiu granda favoro al nia esperantista rondo.